

Budapest. 7an. de Majo. 1960.

Altestimata sinjoro !

Jen vidu kun kelkaj vortoj informas Vin pri nia celo kaj alvoko.

Se Vi havos tempon por letterskribado estu preta informi nin pri la Kongreso.

Bonvolu alvoki atenton de la tutmondaj esperantistaj foto-filmamatoroj, ni tre petas Vi.

Por nia sankta celo, ni intencas kontakti kun ĉiuj foto-filmamatoroj, kaj volas dissendi al ili nian provizoran gazeton "La verda filmrubando"-n, ni petas Vin bonvolu sendi al ni multajn adresojn de foto-filmamatoroj, seriozaj film-fotofakhomoj.



Ni senpacience atendas Vian longan informan leteron kun tro multa da adresoj.

Se Vi havas eblecon bonvolu sendi al ni unu tre bonan bildon pri Brusela pismenekek, ĉar ni intencas eldoni glumarkoj, kaj ni volas uzi la bildon sur nia nova glumark-serio. Eldonota kvanto estos preskaŭ 10.000 ekzempleroj.

Kara samideano ! Ne forgesu tuj respondi al ni, por ni tre grafa afero, ke ni urĝe povu ricevi Vian detalan informon

Elkore ni tre dankas Vian leteron, bv. sendi por ni belan afrankitan leteron.

[Handwritten signature]

Grava alvoko kaj peto al la Esperantistoj de la mondo !!!

La plej efika kaj fruktodona propagandilo de la disvastigado de la lingvo Esperanto estas : la fotografio kaj la filmo.

Per la lerta teknika eluzado de tiuj ĉi du efikaj propagandiloj oni povas atingi la plej grandajn rezultojn interese de la disvastigo de la lingvo Esperanto.

La internacia organiza komitato de la amatora foto-filmkolektivo "Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-filmamatoroj"-konsistanta el foto-filmamatoroj /film-fotofakhomoj / ĝis fino de 1959 jaro/el 42 landoj, ĉimaniere alvokas je aliĝo ĉiujn Esperantistojn de la mondo, kiuj okupadas sin pri fotografado kaj filmado, kaj petas ilin akcepti la celadojn kaj programon de " I.L.E.F." kaj partopreni la laboron de la internacia foto-filmamatora kolektivo.

Estu sankta devo de la tutmonda Esperantistaro, kluboj, kursoj, asocioj, gazetoj, revuoj la apogado de I.L.E.F., en la realigo de ĝiaj celadoj.

Tiu ĉi nia alvoko aperos ĝis fino de 1960 jaro en 14 lingvoj en 300.000 ekzempleroj, por ĝia famo atingi ĉiun parton de la mondo kaj ĉie trovi verajn sekvantojn.

Esperantistoj ! Geamikoj ! Kie ajn Vi vivas en la granda mondo, estu je nia helpo. Atentigu Viajn konatulojn pri nia laboro, multobligu tiun ĉi nian alvokon en kiel eble plej granda nombro da ekzempleroj, kaj dissendu ilin al Viaj korespondantoj kun la sama peto, kaj subskribu Vian nomon kaj adreson !!!

Redakcioj de Esperanto kaj foto-filmrevuoj !!! Publikigu en Viaj gazetoj -revuoj la alvokon de I.L.E.F., - ke la laboro de ĉi lancita movado farigu -pere de Via helpado -ankoraŭ pli rezultoplena.

Radio kaj Televidostacioj de la mondo !!!

Esperantlingvajn programojn dissendantaj radio kaj televidostacioj envicigu tiun ĉi nian alvokon inter Viaj sciigoj kaj tra la ondoj de la etero disradiu ĝin en la tutan mondon.

Esperantistoj ! Geamikoj de la mondo !!!

Helpadu al ni atingi nian celadon por povi efektiviĝi ĝin kiel eble plej rapide. Kontribuu al niajn planojn per Viaj sugestoj, instigleteroj, foto-filmrevuoj, ekzempleroj de Viaj gazetoj, journaloj aperigintaj nian alvokon.

Porcele de respondo ĉiufoje ni nepre petas respondkuponon !!!

Nur tiom ĉi petas de Vi la internacia organiza komitato de **Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-filmamatoroj "**

Sendu ĉion al nia sekretario kaj hungara ĉefdelegito de ILEF.

Leteradreso estas : Esperanto I.L.E.F. Budapest XI. Puszkás tér 13. S-ro. ÁRPÁD G. PÖLÖSKEY .Fakdelegito de filmamatoroj de U.E.A. /Magyarország / Hungario.

Aliĝkotiĝo kaj kotiĝo por membreco 6 + 1o internacia respondkuponoj. Sendu ilin rekte al U.E.A. por dispono de I.L.E.F., kaj tuj indiku Vian intencon.

Esperantistaj Foto-filmamatoroj de la mondo tuj aliĝu al Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-filmamatoroj

Ĉi estas amatora filatelisto kaj kolektanto de albumoj, ĉi kolektas precipe motivaĵojn pri floroj - paperoj - bildoj - fiŝoj



S-ro. ÁRPÁD G. PÖLÖSKEY. SEKRETARIO

ĉi estas amatora filatelisto kaj kolektanto de albumoj, ĉi kolektas precipe motivaĵojn pri floroj - paperoj - bildoj - fiŝoj